n-ro 72

aprilo 2001

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Kotizo 2001

La kasisto dankas pro rapida pago de via kotizo por la jaro 2001. Rigardu sur vi adresetikedo: se sur ĝi estas menciita '2000', signifas ke la kotizo por 2001 ne estas pagita (je redaktofino, meze de marto). Se estas '99', signifas ke la kotizoj por 2000 kaj 2001 restas pagendaj. Eblas antaŭpagi por pluraj jaroj! rr

## Retejo www.komerco.com: nun ankaŭ kun babilejo!

En mia retejo www.komerco.com mi investas cele servi al esperantistoj en ekonomia kampo. Bonvolu viziti ĝin kaj uzu la babilejon (vidu ankaŭ je p. 17).

Ĉielismo WON <komerco(a)public.xa.sn.cn>

## Enhavo

Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2000 . . . . . . . . . . . . . . . 4-7
Financa raporto pri la jaro 2000 . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8-10
Novaj adresoj - novaj membroj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11
Koresponda kurso pri terminologio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 12
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 14
Seminario Storckensohn . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16

**La Merkato** (LM)(ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

---

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ www.xs4all.be/~rotsaert/ikef/

---

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK.
Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo.
Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

**Kontoj**:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB)

**Perantoj**

*Belgio kaj internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be, belga pĝk. 000-0265338-43)

*Ĉeĥio:* S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořaka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/reg.420-631-332507, retpoŝto vlada_hasala(a)iol.cz

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)agora.stm.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)



## Administrado - Grava atentigo al niaj membroj

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 2000 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 8-10 la financan raporton de IKEF por la jaro 2000, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. Je redaktofino (20 marto 2001) la respondo de la revizoro ne estis ricevita. Ni informos la membrojn pri lia opinio en la venonta numero.

3. La estraro notas la sumon de financa malgajno de EUR 951,22 kaj proponas deprenon de tiu malgajno de la kapitalo.

4. La estraranoj s-roj Gilbert, Könyves, Rotsaert kaj Yamasaki, ĉiuj elektitaj en 1999 dum la UK en Berlino, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ĉiuj - escepte de s-ro Yamasaki - pretas rekandidatiĝi. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de ili.

5. Nia statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la proceדon pri aprobo de la financa raporto kaj de la raporto pri agado. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo, Kroatio. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu punktojn 1-3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu punkton 4 supre) okazos tie. Membroj kiuj ne povas veni al Zagrebo, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tian agon la estraro rekomendas. La precizan daton, horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos en venonta "La Merkato" n-ro 73 komence de julio 2001.

La Estraro de IKEF

**Premio Miyoshi por historio studo pri UEA**

En la jardeko 1970-1980 UEA travivis malfacilan periodon. Estus bone ke kolektiĝu informoj pri la periodo. La Premio Miyoshi en 2002 premios la 5 plej bonajn studojn pri tiu temo. Petu la regularon de Alex Humet, <alhu(a)xs4all.be>.

**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2000**

**Membronombro unuafoje falis**

La membronombro falis de 149 fine de 1999 al 145 fine de 2000. Tiuj venas el 42 landoj. Dum 2000 aliĝis 7 novaj kaj ree aliĝis 2 malnovaj - intertempe eksaj - membroj. Ni perdis 13 membrojn, 1 pro morto, 7 pro persona eksiĝo, 5 per eksigo fare de la estraro pro nepago de kotizo. Inter la 145 membroj troviĝas 8 dumvivaj.

Laŭ Laborplano 1998 - 2000 nia celo estis fine de 2000: 200 membroj. Tiun celon ni klare maltrafis.

La nombro de perantoj fine de 2000 estis 7, unu malpli pro demisio de nia ĉeĥa peranto, s-ro Hasala.

**"La Merkato" regule aperis**

Ankaŭ dum 2000 nia interkomunikilo "La Merkato" regule kaj tre akurate aperis kvarfoje.

**Terminara Sekcio sukcesa**

Ĉefa agado de la Terminara Sekcio estis esperantigo de "Incoterms 2000" (aktualigita versio de "Incoterms" - kondiĉo-formuloj en internacia komerco, de ICC - Internacia Komerca Ĉambro en Parizo). Ni sukcesis finfari kaj prezenti la broŝuron sub la nomo "Inkotermoj 2000" ĝustatempe je la UK en Tel-Avivo. Kunhelpis ĉe tio la membroj s-roj YAMASAKI Seiko (IKEF 43) kiel kunordiganto, d-ro Werner BORMANN (IKEF 27), Franz Josef BRAUN (IKEF 4), Ulrich FELLMANN (IKEF 308), Josef MENDL (IKEF 303), d-ro Gianfranco POLERANI (IKEF 12) kaj Roland ROTSAERT (IKEF 3). Kiel apartan servon por niaj "fidelaj" membroj (membroj pagintaj sian kotizon sinsekve dum 5 jaroj), tiuj ricevis "Inkotermoj 2000" senpage. La oficiala prezo estas 19,00 EUR.

Intertempe intensiĝis la kontaktoj kun la Tradukservo de Eŭropa Unio en Luksemburgo kun la celo ke ni rajtu ricevi el la datumbanko Eurodicautom la 11-lingvajn nociojn el niaj fakoj komerco/ekonomio por traduko esperanten.

**Verka agado samnivele kiel en la antaŭa jaro**

La verka agado, kiu okazas precipe en "Monato", internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, estis sur la sama nivelo kiel en 1999. Ankaŭ en la pasinta jaro la 7 samaj aŭtoroj kiel en 1999 aperigis artikolojn en "Monato", nome: Gilbert LEDON (IKEF 177), MU Binghua (IKEF 213), Jiri PATERA (IKEF 276), Roland ROTSAERT (IKEF 3), Marc VANDEN BEMPT (IKEF 251), YAMASAKI Seiko (IKEF 43),



Zandandu Ntomono ZOLA (IKEF 181).

Malgraŭ tiu laŭdinda agado ni devas konstati, ke por grandaj mondopartoj ankoraŭ ne estas kunlaborantoj por "Monato", kvankam loĝas IKEF-anoj tie. Kiu havas talenton por verkado, tiu anoncu sin al "Monato" kiel verkanto (= pagata laboro). Ĉe tiu okazo ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke "Monato" rolas kiel ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de "Monato".

Nia membro s-ro Bo SANDELIN (IKEF 134) tradukis esperanten libron 'La historio de ekonomika pensado' kiun li, kun kolegoj, eldonis svedlingve en 1995 kaj 1998. Estas planita, post reverko kaj kompletigo aperigi ĝin kiel serion en la revuo Monato. Same libroforma eldono estas planata.

Plie aperis en nia interkomunikilo "La Merkato" kelkaj artikoloj pri ekonomiaj aferoj.

**Kongresaj aranĝoj**

Dum la 85-a UK en Tel-Avivo okazis je 28 julio 2000 la Ĝenerala Kunveno de IKEF kun 20 ĉeestantoj, inter tiuj 15 membroj. Tiu iom malgranda nombro proporcias al la malpli granda ĉeestantaro de la UK en Tel-Avivo kompare al la antaŭaj UK-oj en Berlino kaj Montpeliero.

Ĉe la estrara tablo sidis prezidanto Franz Josef BRAUN, financa konsilanto Roland ROTSAERT kaj YAMASAKI Seiko. La kunveno plenumiĝis laŭ la tagordo. La raporto pri agado de IKEF kaj la financa raporto por 1999 estis aprobitaj, kaj sub gvidado de nia revizoro d-ro Gianfranco POLERANI la Estraro estis malŝarĝita. En la elekto estis reelektitaj por dujara oficperiodo la estraranoj Braun, Kurz kaj Wang.

La ĉefaj temoj en la diskutado estis nia laborplano kaj la terminara laboro. Oni konstatis, ke el la antaŭa Laborplano 1998 - 2000 (akceptita dum la Ĝenerala Kunveno en Montpeliero) multaj agaderoj estis ne aŭ nur parte realigitaj. Tial la asembleo decidis plivalidigi tiun laborplanon senmodife ĝis fine de 2003. Koncerne terminaran laboron vidu supre.

Tre interesa kaj informriĉa estis la vizito ĉe la firmao ESHED ROBOTEC en Rosh-Haajnin, proksimume 20 km for de Tel-Avivo, kiu produktas robotojn por instruado en industrio, universitatoj kaj lernejoj. Bedaŭrinde pro samtempe okazinta grava kunsido de la UEA-Komitato, dek komitatanoj kiuj ankaŭ estas membroj de IKEF, ne rajtis forlasi la kongresan kunsidon kaj kunveturi al la firmao.

**Aliaj aranĝoj kun partopreno de IKEF-anoj**

De 1 ĝis 4 aprilo 2000 okazis en Xi'an, Ĉinio, la Unua Esperanta Konferenco pri Ekonomio kaj Komerco en Ĉinio. Ĝin organizis nia estrarano kaj ĉina peranto, s-ro WANG Tianyi (IKEF 117). Partoprenis 20 personoj, ĉefe komercistoj el Ĉinio. Ili raportis kaj diskutis profunde pri komercaj aferoj.

De 10 ĝis 12 novembro 2000 okazis en Prago "Kolokvo pri apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" (KAEST 2000). Ĝin aranĝis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kiel kontribuon al la "Kampanjo 2000" sub aŭspicio de UEA. Partoprenis 41 personoj el 11 landoj. Al la kolokvo kontri-buis pluraj IKEF-membroj per prelegoj: d-ro Petro CHRDLE (IKEF 171) kiel ĉefa organizanto, d-ro Rainer KURZ (IKEF 235), s-ro Josef MENDL (IKEF 303), s-r Jiri PATERA (IKEF 276) kaj s-ro Bo SANDELIN (IKEF 134).

**Kunelaboro kun TAKE**

Tiu kunelaboro evoluas daŭre kaj firme. Laŭplane la venonta paŝo estas komuna seminario por la membroj de ambaŭ fakaj asocioj. Tiu unua seminario estis en preparo dum la dua jarduono. Por havi eble pli grandan aŭskultantaron, ni kune decidis, ke ni organizos ĝin kadre de regula staĝo de "Espéranto France-Est", kies prezidanto estas nia estrarano François Xavier GILBERT (IKEF 14). Ĝi okazos je 20-22 aprilo 2001 en Storckensohn (montarvilaĝo en sudaj Vogezoj, orienta Francio). Kadre de la tuta programo okazos 9 fakaj prelegoj de prelegontoj de IKEF kaj TAKE. Vidu apartan anoncon sur la antaŭlasta paĝo.

Alia laŭplana ero de nia kunelaboro estas havigi staĝlokojn en diversaj landoj por junaj metilernantoj kaj studentoj. TAKE kaj IKEF kiel fakaj asocioj sentas sin kompetentaj por proponi/havigi staĝlokojn por junuloj en niaj aŭ konataj entreprenoj. Ni rolu kiel peranto je la servo de junaj fakuloj.

Elstaran sukceson tiurilatan ni havis per perado de staĝo por s-ino Violette WALTHER, studentino pri ekonomio el orienta Francio. Dank' al anonco en La Merkato, s-rino Walter ricevis plurajn proponojn pri staĝo en diversaj landoj kaj fine ŝi decidis pri staĝo en Ĉinio. Pri ŝiaj spertoj ŝi prelegos en la seminario en Storckensohn.

**Retpaĝaro de IKEF**

Nia estrarano kaj ĉina peranto, s-ro WANG Tianyi (IKEF 117, <komerco(a)public.xa.sn.cn>) daŭre registras, aktualigas kaj disdonas al la membroj kun retaliĝo la retadresojn de IKEF-membroj. Niaj membroj informu lin pri nova aliĝo aŭ adreso.



Dum 2000 ni fine sukcesis ekhavi propran retpaĝaron. Post kiam ni ne trovintis el nia membraro fakulon pri tio, s-ro Rotsaert ellaboris la paĝaron. La adreson www.ikef.org registris ĉina membro James ZHENG (IKEF 237). De tiu adreso estas ligo al www.xs4all.be/~rotsaert/ikef/index.html, kie la paĝoj reale troviĝas. La aspekto estas iom primitiva kaj estas serĉata fakulo por modernigi ĝin.

Krome, s-ro WANG revigigis kaj aktualigis www.komerco.com, kie nun ankaŭ troviĝas babilejo, uzebla por IKEF-membroj kiuj deziras rete diskuti.

**Aliaj praktikaj agadoj**

En ĉiu numero de "La Merkato" aperis anoncoj pri komercaj petoj kaj proponoj de E-istaj komercistoj. La nombro de tiaj anoncoj en 2000 estis 21 (kompare al 27 en 1999 kaj 22 en 1998). Ni aperigas ilin senpage por personoj el landoj kun pagoproblemoj.

La anoncoj montras ke, precipe en evolulandoj, ekzistas deziro por uzi Esperanton en komerco. Tamen, pro pluraj kialoj la komerco kun tiaj landoj malfacilas: mankas profesia sperto, la politika situacio ofte estas malstabila, la produktogamo ne estas konforma al alilandaj deziroj, transporto estas mal-facila kaj - ĉefe - mankas aliro al modernaj komunikiloj kiel telefakso kaj interreto.

**Resumo**

La jaro 2000 evidente ne estis por ni tiom progresa kiel la antaŭaj. Unuafoje la membronombro malkreskis. Ankaŭ la financa rezulto unuafoje post kelkaj jaroj estis malprofita. Kvankam tio estis antaŭvidebla pro la eldono de "Inkotermoj 2000", ĝi estis pli granda ol kalkulite. Fine kelkaj agaderoj regresis (anoncoj de esperantistaj komercistoj) aŭ tute ne okazis (reklamanoncoj en "Monato" por entreprenoj).

Je kontentiga nivelo troviĝis la terminara laboro kaj la verka agado, same kiel la kongresaj kaj similaj aranĝoj. Ĝojige estas ankaŭ la nuna ekzisto de retpaĝaro.

La Laborplano 1998-2000 nomiĝas nun ...1998-2003. Ni havas per tio la ŝancon pritrakti la agaderojn en ĝi ankoraŭ ne plenumitajn. Tial ni denove ripetas la alvokon al ĉiuj membroj, ke ili koncentru sin al agadoj el tiu laborplano, por ne disipi sian tempon, forton kaj monon al flankaj, senefikaj agadoj.

Por la Estraro: Franz Josef Braun

bil



bil

**Spezokonto kaj bilanco (ciferoj sur la mezaj paĝoj la revuo)**

Kontraŭe al la pasintaj jaroj, por la jaro 2000 estas mal-profito. Tio estis iom antaŭvidita pro la eldono de Inkotermoj. Tamen, ne estis antaŭvidita ke ĝi atingos 951,22 EUR. La klarigoj troveblas je enspeza kaj elspeza flankoj:

Ĉe la enspezoj en 2000 ne ripetiĝis la makleraĵoj pro Monato-anoncoj (389,74 EUR).

Ĉe la elspezoj estas pluraj faktoroj:

- La ĉefa ero estas la elspezoj pro terminologia laboro, kiuj por 2000 tute rilatas al eldono de Inkotermoj. Feliĉe tiu sumo finfine estis iom malpli alta ol taksita. Eta kompenso venis el la vendo de IKEF-eldonoj (plejparte Inkotermoj).

- Du aliaj relative grandaj elspezoj estas sub 'ĝeneralaj kostoj':

* Ĉar por la IKEF-ekskurso dum la UK estis malmultaj parto-prenantoj (pluraj interesitoj devis resti en la kongresejo) plej granda parto de la fakturo restis je konto de IKEF (112,50 EUR).

* La kongresan budon (320 EUR) kiun FEL jam de pluraj jaroj luas dum la UK estas interesa, i.a. ĉar ĉi havigas iun fiksan renkontiĝejon al la membroj, sed ĝi estas multekosta kaj postulas deĵoranto(j)n. Plie, en 2000 Flandra Esperanto-Ligo ne havis reprezentanton en la UK kaj sekve ne pagis parton de la budo. Necesas pripensi eble estonte rezigni pri budo kaj limigi nin al uzo de la unu- aŭ duontaga ĉeestado en budo de fakaj asocioj kiun UEA senpage ofertas.

La aliaj gravaj eroj de la spezokonto montras normalan evoluon. IKEF daŭre disponas pri sufiĉe da laborkapitalo, malgraŭ la deficito de 2000.

Mi proponas subtrahi la malgajnon de la kapitalo, kiu tiel atingus 1.797.95 EUR.

Roland Rotsaert, financa konsilanto

**Lernu komercon interrete kaj esperante**

En LM 71 (p. 4) aperis artikolo pri planita kurso de pola lernejo. Barbara Pietrzak de Pola Radio sciigas ke pro la manko de interesiĝo la kurso ne komenciĝis.

**Novaj adresoj**

73. Prof. Chong-Yeong LEE, Shinsegae Tonw Apt. 5-1001, Soosung-Dong, TAEGU, Koreio; rete keast(a)soback.komet.nm.kr

246. S-ro Mulungula Mukeba Jules, c/o J.R.S. Peace Center, P.O. Box 37960, LUSAKA, Zambio

261. Jacob Nordfalk, <nordfalk(a)mobilixnet.dk>, Kongovej 22, DK-2300 København S

302. CHEN Jinyin (Chen Dinsu), Xigu Lintao-jie 304-Chang, Tuiguan-ban, Lanhua 4-Huodon-zhongxin, CN-730060 Lanzhou, Gansu, Ĉinio; fakso +86-931-7557601

**Novaj membroj**

305. S-roj Butcher NSIMBA kaj Jerry MBEMBA - 'BEJE' (Bureau pour l'Encadrement de la Jeunesse), 240B Commerciale Q/7, N'DJILI, KINSHASA, Kongo D.R.; rete bejebbi(a)hotmail.com

306. S-ro Ulrich FELLMANN, Wilhelm-Flögel-Ring 51, D-60437 FRANKFURT AM MAIN, Germanio; rete ulrich.fellmann(a)t-online.de

307. S-ro Santiago ALVAREZ G., Apartado postal No. 54.800, BOGOTA, Kolombio; rete santialv(a)multi.net.co

308. S-ro Radenko MILOŠEVIC, str. Goljak n-ro 43, HR-10000 ZAGREB, Kroatio; rete radenko.milosevic(a)zg.hinet.hr

**Niĝerio** (gazetera komuniko de UEA, tra ret-info)

En la pasintaj jaroj UEA devis ofte averti pri trompaj almozpetoj kaj komercaj proponoj. Lastatempe tiu misuzo mildiĝis, sed daŭras veni komercaj proponoj el Niĝerio.

La leteroj el Niĝerio proponas partoprenon en transpago de enormaj monsumoj kun promeso pri granda gajno. Tiuj proponoj estas tute falsaj kaj temas pri sisteme organizita krima agado. Antaŭe delegitoj de UEA ricevis ilin en anglalingvaj leteroj, sed lastatempe ili komencis veni ankaŭ rete, fakse kaj eĉ telefone, kaj ankaŭ al aliaj esperantistoj ol delegitoj. Ankaŭ la uzata lingvo ĉiam pli ofte estas Esperanto.

Mi denove avertas, ke temas pri pura trompo. Oni ne respondu al la proponoj. Telefaksojn kaj leterojn, kune kun la koverto, oni povas plusendi al la Centra Oficejo de UEA sed oni ankaŭ povas transdoni ilin al la loka polico.



Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA

**Alvoko al junaj fakuloj**

**Koresponda kurso por la evoluigo de terminologio**

Profesoro Jan Werner estas delonge fama en Esperantio pri la evoluigo de scienca kaj teknika terminologio kaj metodoj pri ties sistema evoluigo, pri kiu li verkis eĉ kurslibron. Post la Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), aranĝita pasintnovembre en Prago, li informis min, ke li volonte daŭrigus sian agadon por plua evoluigo de la terminologia laboro.

Li favorus koresponde instrui junajn fakulojn esperantistajn pri terminologiaj metodoj, por ke tiuj estu kompetentaj por sisteme prilabori terminologion pri sia fako private, sed ankaŭ por kontribui al tia laboro enkadre de la iam aktiva, sed lastatempe, pro manko de partoprenantoj, laciĝinta TEC (Terminologia Esperanto-Centro). Interesatoj skribu al Profesoro inĝeniero Ján Werner, Kroftova 84, CZ-61 600 Brno, Ĉeĥio.

Por rapide (retpoŝte) respondi eblajn demandojn, ankaŭ mi estas je via dispono.

HASZPRA Otto <haot(a)freemail.hu>, tra ret-info

**Inkotermoj en kroata televido**

La 26-an de januaro 2001 Televida stacio "Kanal R" en Rijeka, Kroatio, en mozaika programo kun intervjuoj kun diversaj gastoj, gastigis ankaŭ esperantistojn dum ĉirkau 15 minutoj. Partoprenis intervjuon Vjekoslav Morankić, prezidanto de Esperanto Societo Rijeka, kaj Vladimir Margan, membro de la prezidantaro de la societo. Vjekoslav Morankić parolis pri la agado de Esperanto Societo en Rijeka kaj pri esperanta movado ĝenerale, kaj Vladimir Margan pri siaj impresoj dum per- kaj poresperanta, pli ol dumonata, vojaĝo tra Rusio, Kazakio, Uzbekio, Kirgizio, Turkmenio, Irano kaj Turkio.

Inter aliaj demandoj ekaperis jena: "En nuna globaligo de la mondo, esperanto perdas pozicion. Kia estas situo nun?". Vjekoslav Morankić respondis jene: "Ni esperantistoj ne neas gravan rolon de lingvoj de grandaj potencoj kiel lingvoj germana, franca, itala, angla kaj aliaj. Sed internacia kunlaboro okazas ankaŭ en aliaj lingvoj. Ekzistas sennombraj lingvaj niĉoj. Ĉu ni scias en kiu lingvo komercas japanoj el Kalifornio kun sia propra lando Japanio? En internaciaj rilatoj ankaŭ esperantistoj komunikas inter si kiel lingva niĉo. Mi tute hazarde havas ĉi tie unu libron per kiu mi povas tion argumenti,

malgraŭ tio ke mi ne intencis ĉi vespere pri ĝi paroli. Por montri ke la afero estas serioza mi prezentas libron "Inkotermoj 2000", kies originalon (angle-france) eldonis Internacia Ĉambro de Komerco en Parizo, kaj kiu estis tradukita esperanten en kunlaboro kun esperantista faka organizaĵo IKEF. (Intervenis gvidantino per "Montru la libron al kameraoj"; la libro estis videbla tra plena ekrano). Pri la libro ekinteresiĝis miaj amikoj komercistoj en Kroatio sed malgraŭ tio ke klaŭzoj estas en du lingvoj (esperanto kaj angla), ĉiuj klarigoj de kondiĉoj estas nur en esperanto, pro tio al neesperantistoj kiuj scipovas angle el tiu libro povas esti je dispono nur klaŭzoj sed ne klarigoj." (MV)

**Abonhelpa Fonduso**

Estimataj memboj de IKEF,

Kelkfoje estas personoj el landoj kun pagoproblemoj, kiuj interesiĝas pri membreco en IKEF. Sed tiaj personoj el ekzemple afrikaj landoj ofte ne povas pagi nian kotizon laŭ kategorio B = 10 EUR jare. Ni ĉiam rifuzis enkonduki por tiuj trian kategorion; UEA ja ankaŭ ne faras tion.

Alia afero estas, se iuj el nia membraro, troviĝantaj en financa bona situacio, povus kvazaŭ donaci al tiaj homoj la pagon de la IKEF-kotizo. Nepra premiso flanke de la ricevanto estas, ke tiu persono a) regas bone la lingvon, b) okupiĝas pri (laboras, hobie pritraktas aŭ studas) la kampoj komerco, ekonomio, ekonomiko, kaj c) pretas esti aktiva en la senco de niaj laŭstatute celitaj agadoj, ĝenerale favore al akceptigo kaj disvastigo de Esperanto en niaj kampoj.

Kiu el vi pretas al kotiz-donaco por tiaj personoj en IKEF, tiu anoncu sin al s-ro Rotsaert. En kazo de bezono, kiam subteninda interesato volas aliĝi, s-ro Rotsaert informos vin por establi la kontakton kun la interesato.

Franz Josef Braun, prezidanto

**Internaciaj Librotenaj Normoj devigaj en EU ekde 2005**

Ĉiuj borse kvotitaj entreprenoj en EU ekde 2005 devos apliki la novajn internaciajn librotenajn normojn (angle: IAS, www.iasc.org.uk). Jam ekzistas nacilingvaj versioj por 30 lingvoj. Tamen, por kelkaj lingvoregionoj, i.a. la nederlanda, neniu instanco emas pagi la tradukkostojn de la giganta regularo (62 normojn, 1300 paĝojn).

RR, laŭ belga gazeto 'Tijd', 8.3.2001

**Komercaj petoj kaj proponoj**

**Ĉinio**

Changzhou Ruirong Net Business and Trade Co. Ltd, kunlaboranta kun Changzhou-a Esperanto-Asocio, povas im/eksporti produktojn kaj interŝanĝi informojn pri komerco kaj ekonomia aktivado. Adreso de la kompanio: 1104 Heping Building, Changzhou 213003; fakso +86-516-8161828; rete zhchsh(a)changzhou.cngb.com; http://www.china116.com (komerca retpaĝo en ĉina) kaj http://zhchsh.3322.net (pri la asocio en ĉina). Esperanta reprezentanto: S-ro Zhang Changsheng, 61-3 Ma Jia Cun,Tian Ning Qu, Changzhou, Jiangsu 213014; telefono/fakso +86-519-8823391, rete zhchsh(a)public.cz.js.cn.

Huang Ting-sheng (retadreso: nasko(a)21cn.com; vidu LM 72) verkis artikolon pri la ĉina bilomerkato, Estas planita aperigo post kelkaj monatoj en la revuo Monato.

**Irano**

Ni eksportas sekajn fruktojn (sekvinberojn, pistakojn...), tapiŝojn, higienajn produktojn; ni importas higienajn produktojn, tualetaĵojn kaj ludilojn. S-ro Bahram Karimzadeh, Second floor, No 27, Shahid Changizi street, Jamal Zadeh Street, Jomhori Avenue, Tehran. Rete: <postchi1(a)yahoo>.

**Kongo D.R.**

FLAM (Fabrikanaj Laboristoj Memstaraj) spertiĝis pri la fabriko de trinkaĵoj ekstraktitaj el avokadujo kaj aliaj tropikaj fruktoj. Ĝi serĉas kunlaborantojn. Estas ofertoj sed mankegas iloj (por verŝi trinkaĵojn el botelo ktp...) kaj taŭgaj boteloj. S-ro Mbo Nsele Moyame (IKEF 282), BP 14518, Kinshasa 1.

Mi vendas lignojn, statuetojn el nigra ligno, raŭpojn, mielon, malakiton, kupron... kaj produktoj el malakito kaj kupro. Mi povas esti utila iuj kiuj volas esplori afereblecojn aŭ por krei societojn. Kontaktu: Jerry MBEMBA (IKEF 305), B.P 166 KIN XX, 240B, commerciale Q7 N'DJILI, Dem. Resp. Kongo;
tel. +2349940236; rete<bejebbi(a)hotmail.com>.

**Litovio**

Por kudrofirmao mi deziras aĉeti uzitajn ilojn:
1. Universalajn kudromaŝinojn: Juki DDL-555; Juki DDL-415; Brother DB2-B705; Singer 591 (proksimume 15 ekz.)
2. Kudromaŝinojn kun du kudriloj: Juki LH-1152-4; Durkopp 380-13305 (2 ekz.)



3. Kudromaŝinon (overloko) kun kvin fadenoj: Brother DB2-0791; Rimoldi 13582 (2 ekz.)
Antaŭdankas Stasys Kruzinauskas (IKEF 207); tel. +370-99-04065; rete <stkruz(a)rc.lrs.lt>.

**Rusio**

Al rusia malvarmokombinumo necesas investantoj !

Nia firmao Ĥopjor (rekonita en la jara 2000 kiel plej bona detalvenda manĝproviza firmao inter firmaoj de sudrusia regiono) estas tenanto de 67% de la akcioj kaj enestas en konsilio de direktoroj de la plej granda siatipa entrepreno de Volgograda regiono 'Volgograda Malvarmokombinumo'.

Mallonga informo (plenan ni sendos al interesiĝontoj) pri Malvarmokombinumo:

1) entrepreno havas 35308m2 da tero, inkluzive plenigan per konstruaĵoj areon 11700m2;
2) estas kovrita fervojplatformo kaj alveturaj vojoj al ĝi de fervojstacio; 3) konvencia ujeco de malvarmigilo estas 13055 tunoj;
4) sur teritorio konstruitas unuetaĝa domo 45x55m (planitis kolbasa fabriko);
5) oportune situas en Volgograd ĉe pogranda manĝproviza merkato, apud ĉefa ŝoseo Volgograd-Moskvo, nemalproksime de flughaveno.

Ĥopjor administras 'Volgogradan Malvarmokombinumon' kaj invitas ĉiujn dezirantojn al kunlaborado.

TELEFONU ! ALVENU ! Hotelo kaj aŭto estos provizataj al alilandanoj !

ATENTON !

Plenpotencigo de Malvarmokombinumo kaj kreado de aldonaj produktejoj (por refabrikado de viando, fiŝo, lakto ktp.) sur ĝia teritorio promesas al investantoj multsignifan financan profiton !

Informas: s-ro Eduard KOLOSOV, Firmao "Ĥopjor", str.K.Libkneĥ ta 13, RU-400001, Volgograd, Rusio.
Telefono/fakso +7-8442-358079, retpoŝto: hoper(a)vistcom.ru.
Kontaktoj en angla lingvo: nur skribe.



**Fakprelegoj en popularscienca stilo**

La 49a Printempa Staĝo de Orient-Franca Esperanto-Asocio okazos la 20an, 21an kaj 22an de aprilo 2001 en montara vilaĝo Storckensohn, je 40 km de urbo Mulhouse en orienta parto de Francio. Ĝin organizas la loka grupo Mulhouse-Esperanto kun la kutimaj kursoj por komencantoj, progresantoj kaj praktikantoj.

Aldone al tio okazos seminario, kiu ricevos specialan pritrakton. Du fakaj asocioj, TAKE kaj IKEF, prizorgos serion da prelegoj fare de fakuloj pri plej diversaj temoj sed en popularscienca stilo por klera publiko. Jen kelkaj el la planitaj prelegoj:

Kemio por nutraĵoj (Robert Dueny, F)
Konstru-fiziko (Fabien Van Mook, NL)
Polderoj en Nederlando (Peter Den Breems, NL)
"EVG"-konstruado kaj ĝia elektra muntaĵo-sistemo (Zoltán Könyves, H)
Esperanto kaj ties literoj en komputilo kaj reto (André Grossmann, F)
Komerco per la reto (*e-commerce*) (F.J. Braun, D)
Memortekniko (Rainer Kurz, D)
Spertoj el staĝo en ĉina firmao (Violette Walther, F)
Sistemo de Komercaj Ĉambroj en Francio (F.X. Gilbert, F)

Pliaj informoj estas haveblaj ĉe s-ro Robert KUENY, 30 Rue des Champs, FR-68690 GEISHOUSE, Francio; tel. 33(0)3.89.82.37.62; rete <mulhouse.esperanto(a)mageos.com>

**Invito al babilejo**

Ni invitas vin partopreni nian ret-renkontiĝon internacian en www.komerco.com/babilejo.
Temo: interkonatiĝo de esperantistoj kun intereso pri komerco kaj ekonomio.
Dato: Sabato 24 Marto 2001.
Horo: 15:00-18:00 internacia 16:00-19:00 pariza
18:00-20:00 moskva 23:00-01:00 pekina
24:00-02:00 tokia horo 10:00-13:00 washintona
Varman bonvenon!

ĉina peranto de IKEF, s-ano WANG Tianyi (Chielismo WON)
informo(a)komerco.com - www.komerco.com